# ATEISMO

## Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo



Librovendejo “Dominicanen” en iama preĝejo - Maastricht, Nederlando
(Foto de: Chris Fitch)

N-ro 28 http://ateisto.org Majo 2019

# Vorto de la Redaktoro

En Aprilo ĉi-jare la mondo estis ŝokita kiam ekbrulis la fama katedralo Notre-Dame en Parizo. Eĉ ateistoj kiel mi sentis profundan ĉagrenon pro tiu incendio. La novaĵoj pri Notre-Dame ekaperis sur mia ekrano baldaŭ post kiam mi komencis verki artikolon pri perforta kristanigo en Eŭropo. Mi ekhavis iom strangan senton. Nu ja, kristanismo en Eŭropo havas du vizaĝojn – unu de netoleremo, perforto, persekutado, militado, kaj la alia de beleco, kulturo, humanismo, bonfarado. Notre-Dame, kiel multaj aliaj katedraloj en Eŭropo, estas rimarkinda arta kaj arkitektura kreaĵo, kiu ankaŭ estas ligo inter la nuntempo kaj la pasinteco – parizanoj de la 14a jarcento vidis pli-malpli la saman strukturon kiel nunaj parizanoj kaj turistoj. Do ja ĝi estas valoraĵo, simbolo de civilizo por ĉiuj senkonsidere de ties religio aŭ senreligieco.

Okazis ĉi-jare ankaŭ du aliaj mondskale ŝokaj eventoj ligitaj kun preĝejoj – la terorisma pafado marte en du moskeoj en Nov-Zelando, en kiu 51 homoj estis mortigitaj, kaj la terorisma bombado paskodimanĉe de tri kristanaj preĝejoj kaj tri hoteloj en Srilanko, kiu mortigis 258 homojn. Pasintan oktobron en Usono, 11 homoj estis mortpafitaj en sinagogo. Eĉ fervoraj ateistoj ne atakas preĝejojn, ne mortigas homojn preĝantajn. Ne ekzistas ateismaj terorgrupoj. Religia ekstremismo, islamofobio, antisemitismo, rasismo kaj ksenofobio instigis tiujn atakojn, aŭ pli mallonge: netoleremo kaj malamo.

Katedraloj kiel Notre-Dame estas heredaĵoj de epoko, kiam religio kaj eklezioj ludis grandan rolon en eŭropaj socioj. Nun konstrui grandegan, arkitekture majestan, arte riĉan katedralon estas preskaŭ neimageble. En Pollando oni ankoraŭ konstruas grandajn preĝejojn, sed ili estas plejparte sengustaj, rememorigantaj pri la arkitekturo de totalismaj reĝimoj. Belaj konstruaĵoj, eĉ se inspiritaj de religio aŭ servantaj ĝin, eĉ se restaĵoj de iama eklezia potenco, estas valoraj posedaĵoj de nia civilizo ankoraŭ hodiaŭ.

Kristanismo, kiu ja estas grava elemento de okcidenta civilizo, havas samtempe historion de barbarismo. Do oni povus diri, ke la civilizo povas esti iugrade necivilizita. Oni ankaŭ vidas tion en la

amerikaj imperioj kun sia homa oferado – sed samtempe la kristana detruado de tiuj kulturoj estis necivilizita. Nuntempe, tiel nomataj "blankaj naciistoj" propagandas ke la "blanka, kristana civilizo" estas minacata de islamaj enmigrintoj kaj diversaj aliaj – sed ĝuste pro tia aserto oni ne povas nomi tiujn naciistojn civilizitaj. Plena civilizo signifas toleremon, kunekzistadon, racion, humanismon (en ĉiu senco), homajn rajtojn, liberecon de pensado. Ateismo estas grava parto de civilizita socio – ĉar tia socio akceptas ateismon, ne subpremas aŭ marĝenigas ĝin; ĉar ateismo kontraŭas dogmojn kaj ekstremismon bazitan je dogmoj; ĉar ateismo valorigas racion, humanismon kaj liberpensadon. Civilizitaj valoroj estas civilizitaj valoroj, ĉu devenintaj de iu religia kredo, ĉu sendependaj de tia kredo. Kiam ajn okazas perforto kontraŭ tiuj valoroj, okazas incendio en nia civilizo, en Notre Civilisation.

## Kial mi estas senreligia: pensoj de fizikisto

Pluraj homoj demandis al mi kial mi diras, ke mi ne kredas je Dio. Jen mia respondo.

Mi ne ŝatas tiujn, kiuj kondutas bone pro la timo de la infero. Mi preferas tiujn, kiuj kondutas bone ĉar ili ŝatas konduti bone. Ne plaĉas al mi tiuj, kiuj estas bonaj por komplezi al Dio. Mi preferas tiujn, kiuj estas bonaj ĉar ili estas ja bonaj. Mi ne emas respekti miajn samspeciulojn ĉar ili estas gefiloj de Dio. Al mi plaĉas respekti ilin ĉar ili estas estaĵoj kiuj sentas kaj suferas. Al mi ne plaĉas tiu, kiu sin dediĉas al proksimulo kaj kultivas la justecon pensante tiamaniere plaĉi al Dio. Al mi plaĉas tiu, kiu sin dediĉas al proksimulo ĉar li sentas amon kaj kompaton por la homoj.

Al mi ne plaĉas senti min en komuneco kun grupo da homoj, kiuj silentas ene de preĝejo kaj aŭskultas diservon. Mi ŝatas senti min en komuneco kun grupo da homoj, kiuj rigardas miajn geamikojn en la okuloj, parolas kun ili kaj vidas iliajn ridetojn. Mi ne ŝatas emociiĝi antaŭ la Naturo ĉar Dio kreis ĝin tiel bela. Al mi plaĉas emociiĝi ĉar ĝi estas ja tiel bela.

Mi ne ŝatas konsoliĝi pri la morto pensante ke Dio akceptos min. Mi



Carlo Rovelli, itala fizikisto (Foto de: BBC)

ŝatas rigardi vidalvide al la limigiteco de nia vivo kaj lerni ri-deti ameme al nia frati-no, la Morto. Ne plaĉas al mi silenti kaj preĝi al Dio. Mi ŝatas si-lenti kaj aŭs-kulti la profun-daĵojn de silento. Mi ne ŝatas danki Dion: mi ŝatas vekiĝi matene, rigar-di la maron kaj danki la venton, la ondojn, la ĉielon, la parfumon de plantoj, la vivon kiu vivigas min, kaj la Sunon kiu leviĝas.

Al mi ne plaĉas tiuj, kiuj asertas, ke Dio kreis la mondon, ĉar mi opi-nias, ke neniu scias de kie devenas la mondo; mi opinias, ke tiu, kiu havas certecon pri tio iluziiĝas; mi preferas rigardi vidalvide al la mis-tero, prefere ol provi estingi ĝin per fabeloj. Mi ne ŝatas kredantojn je Dio kiuj konas la Veron, ĉar mi opi-nias, ke ili estas nesciantoj kiel mi. Mi opinias, ke la mondo por ni estas ankoraŭ senfina mistero. Al mi ne plaĉas tiuj, kiuj jam scias la respon-dojn. Mi pli ŝatas tiujn, kiuj serĉas la respondojn kaj diras “mi ne scias”. Al mi ne plaĉas tiu, kiu scias kio estas bono kaj kio estas malbono, ĉar li apartenas al eklezio, kiu havas monopolon pri Dio, kaj ne vidas kiom da aliaj konfesioj ekzistas en la mondo. Kiom da diversaj moraloj, kaj ĉiu sincera. Mi ne ŝatas tiun, kiu diras al ĉiuj kion fari, ĉar li estas forta danke al sia Dio. Plaĉas al mi tiu, kiu donas humilajn konsilojn, kiu vivas tiel ke mi gapu kaj admiru lin, kiu faras elektojn emociigajn kaj pensigajn.

Al mi plaĉas paroli al geamikoj, provi konsoli ilin se ili suferas. Plaĉas al mi paroli al plantoj, sensoi-figi ilin. Ami. Rigardi la ĉielon silen-te. Mi ŝatas stelojn. Senfine. Mi ne ŝatas tiun, kiu fuĝas en religion kiam li sentas sin perdita, kiam li suferas; mi preferas tiun, kiu akcep-tas la venton de la vivo, kaj scias, ke la birdoj de la aero havas sian nes-ton, sed ke li, homo, ne havas lokon por apogi sian kapon.

Ĉar mi volus simili al homoj, kiuj plaĉas en tiuj ĉi diversaj manieroj kaj ne al tiuj, kiuj ne plaĉas, mi ne kredas je Dio.

*Carlo Rovelli estas membro de la Internacia Akademio pri Filozofio de Sciencoj kaj de la Universitata Instituto de Francio, estras la esploran grupon pri kvantuma gravito en la Universitato de Aix-Marseille.*

Tradukita de: **Pino Lalli (Italio)**

## Klimato kaj religia kredo

En mia gazeto en februaro aperis artikolo, kiu ege impresis min. Ĉar mi opinias, ke la enhavo estas tre pripensinda, mi ĉi-sube prezentas mian esperantigon:

### Klimato? Ni preferas kapitulacion!

La homaro estas tro stulta por pluvivi. Ĉi-momente bedaŭrinde multaj aferoj certigas pri tio: *homo sapiens* ne kapablas organizi sin tiamaniere, ke la multaj miliardoj da ĝiaj individuoj povas ĉiuj vivi en paco. Motivo por tiu penso estas raporto tiel banale katastrofa, ke ĝi kaŭzas nur rezignacion: la pasintaj kvar jaroj estis la plej varmegaj mondvaste depost la eko de detalaj meteorologiaj registroj. La tutgloba plivarmiĝo progresas kaj senbazigas la civilizon konatan de ni.

Supozeble tiun ĉi tekston legas ankaŭ personoj, kiuj opinias la klimatan ŝanĝiĝon propaganda aserto de "ekologi-iluminitoj". Jes, certe: la unua frazo celas al vi. Sed ĝenerale dirite: kelkaj konfuzuloj ne estus grava problemo – se ne ekzistus aliaj homoj, kiuj scias, ke la klimata ŝanĝiĝo estas problemo farita de homoj. Kiuj scias, kiel haltigi ĝin. Kiuj scias, ke ekzistas la teknologioj, la politikaj kaj ekonomiaj rimedoj, la kontraktoj, la institucioj – kaj kiuj tamen ne kapablas agi sufiĉe rapide.

La problemon oni povas analizi en multpaĝaj eseoj: ja ekzistas tiu malbenita tutmonda ekonomia sistemo kaj ĝiaj mekanismoj de la eterna "pli", la eterna kreskado. Kiuj do per socia selekto akiris altan nivelon povas fari mirigajn "montrofenestrajn" paroladojn pri la protekto de la klimato... kaj samtempe

atentigi pri la senkompata konkurenca premo, kiu bedaŭrinde malebligas pli rezolutan agadon. Ekzemplo estu la germana debato pri fino de karbouzo ĝis 2038: tro malrapida




por atingi la celojn de la Pariza Konferenco pri Klimata Protekto, tamen plena de esceptaj vojetoj por eksiĝi eĉ pli malfrue. Se ĉiuj agus tiel, la klimata ŝanĝiĝo ne estus haltigebla. Ho, fakte? Sed atentu: bedaŭrinde ĉiuj agas tiel.

Se eĉ en Germanio kun ties vigla movado favora al vivmedio tio estas la suma rezulto, tutmonde evidente ne plu restas esperoj. Do ni estu honestaj: la laŭdire moralema parto de la tutgloba supera kaj meza klasoj mensoge trompas sin absolute. Pli honeste estus simple kapitulacii. Simple forĵeti tiun tutgloban "respondecbazitan" etikon, kiu restas sen konsekvencoj. Por parto de la loĝantaro de la Tero, la 21a jarcenton, pro la varmiĝo de la klimato, karakterizos ekstremaj veterfenomenoj, fuĝo, milito kaj malsato.

Ni do dediĉu nin al la volupto. Al la konsumo. Ni kiel la lasta generacio, al kiu tio eblas ankoraŭ. Direkte al la pereo gaje gliti, veturi, flugi. *Hej!* (Sed ŝŝ! Nenion diru al la multnombraj gelernantoj manifestaciantaj pro klimataĵoj! Nur lasu ilin aktivi.)

*Aŭtoro: Ingo Arzt; originala titolo: "Klima? Lieber Kapitulation!" – aperis en* die tageszeitung, *7 februaro 2019*

Ŝajnas al mi, ke la aŭtoro unuakaj eĉ duarigarde komplete pravas. Sed kiel tiu temo rilatas al ateismo?

Multaj religioj apogas la ideon, ke la mondo estas kreitaĵo, kies

kreinto estas iu dio. Ĉar dio estas pli-imagata kiel perfekte saĝa kaj potenca estaĵo, religiaj doktrinoj diras kutime, ke dia kreado nur povas okazi laŭ inteligenta koncepto, kaj ke do ankaŭ la evoluo de la tuto ne povas esti hazarda aŭ sensenca. Religia kredanto do subjektive certas, ke neniel povas okazi tute ĥaosa pereo de la homaro pro iuj "hazardaj" kaŭzoj. Sekve religioj kutime havas eskatologion; alivorte ilia doktrino ampleksas asertojn pri la estonteco de la mondo. Plej ofte tio implicas, ke la tutmonda evoluo havas ian celon, kutime karakterizata kiel "regno de la ĉieloj". Iam venos la "lasta tago" kun ja granda katastrofo, sed post ĝi la pluvivantaj homoj (eventuale nur la "justuloj") ĝuos tute idealan vivmedion, la "paradizon".

Tiu subjektiva certeco estas do religia kredo, kaj tia kredo, oni supozus, ĉe ateistoj ne ludas rolon. Ŝajnas tamen, ke ankaŭ ĉe anoj de strikte sekulara mondpercepto pli-malpli malkaŝe regas la konvinko, ke "nia mondo" estas tiom stabila, ke en la estonteco la evoluo de nia civilizo laŭgrade akiros pli kaj pli kontentigajn stadiojn. Kelkaj fidas je la tekniko, kelkaj je la politiko, kelkaj je la socia etiko. En ĵurnaloj oni ofte povas legi frazojn kiel: "post cent jaroj oni ridos pri niaj problemetoj" aŭ "post du pluaj generacioj la kancero estos venkita!" aŭ "Post okdek jaroj la homoj miros pri nia primitiva vivmaniero" – kvazaŭ ekzistus neniu dubo, ke post okdek jaroj plue ekzistos homa vivo sur nia planedo en la konataj al ni formoj. Ŝajnas al mi, ke ĝuste tiu certeco estas kvazaŭ religia, neracia restaĵo de fido je iu dio kaj je liaj "bonaj intencoj". Ni nomas tion principa optimismo aŭ fido je "la progreso", dum ĝuste tiu fido malhelpas nin vidi, ke nia "progreso" glitadas al tuttera katastrofo.

**Winfried Schumacher**
**(Germanio)**

## Perforta kristanigo en Eŭropo: persekutado de paganoj

Eŭropo estas konata kiel la ĉefkontinento de kristanismo. Fakte, dum multaj jarcentoj la termino "Kristanujo" estis sinonima kun Eŭropo. Sed la kontinento havas longan kaj ampleksan historion antaŭkristanan kun indiĝenaj politeismaj religioj, kies anoj estis nomataj "paganoj", origine mallaŭda vorto uzata de kristanoj. Kristanismo, okcident-azia religio, disvastiĝis per konvertado de paganoj tra la tuta kontinento. Granda proporcio de tiu konvertado estis farita perfor-

te, per subpremado, teroro, detruado kaj masakrado – en preskaŭ ĉiu parto de Eŭropo.



Karolo la Granda, kristana imperiisto
(Pentraĵo de: Caspar Scheuren, ĉe Centre Charlemagne, Aachen)

Kristanismo naskiĝis en la Romia Imperio, en la provinco de Judeo, kaj disvastiĝis sufiĉe senobstakle tra la imperio. Kristanoj spertis okazojn de diversspeca persekutado en Romio, tamen dum jarcentoj kristanaj verkistoj ege troigis ĝian amplekson. Ĝis la tempo de la unua kristaniĝinta imperiestro Konstantino, troveblas verdire nur ĉirkaŭ 10 jaroj de pli grandskala persekutado (speciale dum la regadoj de Decio kaj Diokleciano) el 300 jaroj, kaj eĉ tiam ne okazis tre multe da perfortado kaj sangoverŝado. Konstantino eldonis edikton de religia tolerado en 313 p.K. kaj diversmaniere favoris la kristanojn. Kun la oficiala akcepto de kristanismo, komenciĝis persekutado de paganoj, kiu daŭris dum jarcentoj tra tuta Eŭropo: persekutado, kiu estis multoble pli severa ol tio, kion spertis la fruaj kristanoj en Romio.

La persekutado komenciĝis iugrade jam dum la regado de Konstantino, kiu ordonis la detruadon de iuj temploj de la tradicia romia religio. Sed li ankaŭ provis subpremi kristanajn herezulojn, speciale la arianojn. Tio eble estis la komenco de longa historio de persekutado de alipensanoj ene de kristanismo. Tamen, pli serioza persekutado de paganoj komenciĝis sub la regado de Konstancio II, filo de Konstantino – estas ironie, ke li estis ariano. Post lia morto en 361 pasis 15-jara periodo de ĝenerala toleremo por paganismo, sed ekde 375 rekomenciĝis persekutoj, kulminantaj en kontraŭpaganoj dekretoj de la imperiestro Teodozo I en 389-91. Jam en 380 Teodo-

zo kaj du kunimperiestroj eldonis edikton, kiu formale igis nicean kristanismon la oficiala religio de la Romia Imperio. Kontraŭpagana politiko daŭris en la Bizanca Imperio, atingante sian apogeon sub la fama Justiniano en la 6a jarcento.

Malgraŭ ĉiuj oficialaj klopodoj subpremi paganismon kaj ankaŭ amasatakoj fare de ordinaraj kristanoj, instigitaj de pastroj kaj monaĥoj, ĝi tamen daŭre havis vastan subtenon je ĉiuj sociaj tavoloj. Multaj kristaniĝintaj homoj sekrete plu praktikis sian tradician politeismon. Kvankam plejparte la ŝtato ne masakris paganojn, ĝi tamen leĝigis mortpunon por diversaj agoj kaj ja sufiĉe multe da paganoj estis mortigitaj; krome, ili estis enkarcerigitaj kaj torturitaj, multaj temploj estis detruitaj kaj prirabitaj, diversaj ritoj malpermesitaj, privataj propraĵoj de paganoj konfiskitaj, paganismaj altlernejoj fermitaj, skribitaj verkoj bruligitaj.

Se temas pri la cetero de Eŭropo kaj la jarcentoj post la falo de la Okcidenta Romia Imperio en 476, t.e. la mezepoko, okazis grandskala batalado kontraŭ paganismo. Tutcerte, multaj paganoj estis pli-malpli pace konvertitaj de misiistoj, aŭ sekvis la ekzemplon de siaj tribestroj aŭ ŝtatestroj kristaniĝintaj ĉu pro vera konvinkiĝo, eble danke al misiista persvado, ĉu pro praktikaj strategiaj kialoj. Sed multaj konvertiĝis ĉar iliaj estroj tion faris kaj poste ordonis al siaj regatoj fari la samon, kvankam en iuj kazoj jaroj aŭ eĉ jardekoj estis bezonataj por akiri plenan obeon (kiel ekzemple ĉe la frankoj). Tamen, multaj aliaj, kaj regantoj kaj regatoj, rezistis kristanigon, kaj estis atakataj kaj masakrataj ĝis ili submetiĝis al la “sola vera religio”. Ĉu perforta, ĉu volonta (aŭ volonta pro punad-minaco!), konvertiĝo al kristanismo estis ĉefe procezo desupra. Ni rigardu nun kelkajn gravajn okazojn mezepokajn de persekutado kaj perforta konvertado.

La fama Charlemagne (Karolo la Granda) – kristana reĝo de la frankoj, la unua imperiestro de la tiel nomata Sankta Romia Imperio, kaj hodiaŭ heroo en Francio kaj Germanio kaj krome simbolo de eŭropa unueco – militis dum 30-jara periodo kontraŭ la paganaj saksoj, granda ĝermana tribaro. Li estis religia fanatikulo, kiu celis ne nur konkeri ilin kaj ilian teritorion, sed ankaŭ konverti ilin al kristanismo. Sed ili forte rezistis. Karolo eldonis dekretojn, kiuj postulis mortpunon por saksoj, kiuj rifuzis baptiĝi. En la jaro 782 li ordonis la senkapigon de 4500 militkaptitaj saksoj en Verden,

Saksio – la masakro estis farita dum unu tago kaj estas inter la plej grandaj religiaj brutalaĵoj en la eŭropa historio. Laŭ unu takso, entute dutrionoj de la saksoj estis mortigitaj de la frankoj. Karolo perforte konvertis ankaŭ aliajn, pli malgrandajn naciojn en Eŭropo kiel la ĝermanaj frisoj. Oni laŭdas lin pro gamo de pozitivaj, civilizaj atingoj, sed li estis samtempe militema, amasmurda, kristan-ĝihadisto!

Povas esti, ke la paganaj vikingoj komencis ataki lokojn en Britio kaj la eŭropa ĉeftero reage ĝuste al la kontraŭpagana militado kaj kristana ekspansiismo de Karolo. Eble ne estis hazardo, ke ilia unua celo estis la angla monaĥejo de Lindisfarne, ĉirkaŭ 10 jarojn post Verden. Ĉiuokaze la skandinavoj ne tro volonte akceptis kristanismon kaj la procezo de ilia kristanigo daŭris 300 jarojn. En Norvegio estis aparte forta rezisto. La norvega reĝo Olaf I (regis 995-1000), kiu konvertiĝis en Britio kelkajn jarojn antaŭ sia kroniĝo, estis fanatika kristano, kiu perforte disvastigis sian novan religion, detruante paganajn templojn kaj mortigante kaj torturante rezistemajn paganojn. Post la morto de Olaf, multaj revenis al sia malnova religio, sed sekvonta Olaf, reĝiĝinte en 1015, rekomencis la brutalan kampanjon kristanigi la norvegojn. Konsidere kiom malvolonte kaj supraĵe la nordianoj kristaniĝis, estas ironie, ke ĉiu nordia lando havas krucon en sia flago!

Ni saltu trans la Baltan Maron al Pollando, kiu najbaris al landoj konkeritaj de Karolo. Nuntempa Pollando estas konata kiel fortikaĵo de katolikismo, sed iam ĉi tie, kiel ĉie aliloke en Eŭropo la loĝantaro estis pagana. Ĝenerale la slavoj relative malfrue aliĝis (kun diversaj gradoj da volonteco) al kristanismo. Pro politikaj kialoj ligitaj kun najbara Bohemio, la pola reganto Mieŝko I kaj granda parto de lia kortego konvertiĝis al kristanismo en 966. Mieŝko sekve provis desupre konverti siajn regatojn, sed ili plejparte ne emis forlasi sian tradician kredaron, kaj fine en la 1030-aj jaroj, dum la regado de Mieŝko II, ekflamis granda ribelo kontraŭkristana, la "Pagana Reago". La ribelantoj detruis multajn preĝejojn kaj monaĥejojn, mortigis pastrojn. Post pluraj jaroj de kaoso, filo de Mieŝko II, la duko Kasimiro I sukcesis subpremi la ribelon kun la helpo de eksterlandaj militfortoj. Nur en la 12a jarcento kristanismo fine venkis en Pollando. Denove, pro devigo kaj perforto, eŭropa popolo kristaniĝis.

Kaj laste, ni rigardu gravan kristanigan fenomenon, eble surprizan



Germanaj Kavaliroj milite disvastigas kristanismon

por iuj legantoj. La Krucmilitoj ja estas vaste konataj – eŭropaj kristanaj armeoj vojaĝantaj al la Mezoriento por batali la islamanojn por rekonkeri la Sanktan Landon. Sed malpli konataj estas la krucmilitoj ene de Eŭropo mem, kontraŭ paganoj kaj nekatolikaj kristanoj. Dum ĉirkaŭ 250 jaroj, ekde la mezo de la 12a jarcento, diversaj katolikaj fortoj militis kontraŭ paganaj popoloj – baltianoj (litovoj, latvaj triboj, estonoj, prusoj), finnoj kaj soraboj – kun la oficiala aprobo de papoj. Tiuj popoloj forte rezistis la kristanajn agresantojn. Aparte notindaj estis la krucmilitiroj kontraŭ la baltianoj fare de la Germanaj Kavaliroj. Interalie, dum 60 jaroj ili batalis kontraŭ la prusoj – multaj estis masakritaj, aliaj fuĝis, kaj la resto fine submetiĝis al kristanigo kaj germanigo. Ĉio ĉi kondukis al la malapero de tiu popolo kaj ĝia lingvo. La regantoj de Litovio akceptis kristaniĝon en 1386 pro alianco kun Pollando. Multaj litovoj hodiaŭ fieras, ke ilia lando estis la lasta, kiu kristaniĝis!


Kiel ni vidas, la historio de kristanismo estas plena je trudado kaj perfortado eĉ sen mencii la Inkvizicion kaj *Conquista*. Ĉiu kristano hodiaŭ devus scii tion. Post komenca fazo de ĉefe volonteca disvastiĝado, ĝi fariĝis ŝtata religio kaj ekde tiam dum multaj jarcentoj servis kiel ilo kaj ideologio de regantoj – kaj samtempe regantoj estis iloj de la (katolika) eklezio. Por ambaŭ, la ĉefa celo estis potenco. Kompreneble, forta, eĉ fanatika, kristana kredo ankaŭ ludis gravan rolon. Politeismaj religioj estis la indiĝenaj kredaroj de eŭropanoj enradikiĝintaj en siaj socioj – sed venis tute fremda netolerema monoteisma religio, kies disvastigado bezonis multe da premo kaj teroro.

**Nyegosh Dube (Pollando)**

*Artikolo verkita surbaze de informoj interalie en Vikipedio, churchandstate.org.uk, medievalists.net, medievalnews.blogspot.com kaj kelkaj libroj, inkluzive de "Outline of History" (H.G. Wells) kaj "Europe: A History" (N. Davies).*

## Georges Eliot: Ne precize ateisto

"Mi estas justa kaj honesta, ne ĉar mi atendas pluvivi en alia mondo, sed ĉar spertinte la doloron de maljusteco kaj malhonesteco kontraŭ mi mem, mi kunsentas kun aliaj homoj, kiuj suferus la saman doloron, se mi traktus ilin maljuste aŭ malhoneste. Kiel mi trompu mian najbaron en ĉi tiu mondo pro neekzisto de alia mondo, en kiu mi mem estus trompata? Mi estas honesta, ĉar mi ne ŝatas mistrakti aliajn homojn en ĉi tiu vivo, ne ĉar mi timas mistraktadon de mi mem en alia. La fakto estas, ke mi ne amas nur min mem, kvankam en la menso de iuj religiuloj tio ŝajnas logika certeco. Mi sentas dolĉan amon al miaj edzino kaj infanoj kaj amikoj, kaj pro tiu amo mi komprenas similajn emociojn en aliaj homoj. Kun angoro mi observas la suferojn de mia homfrato, kaj mi sentas lian suferadon des pli akre ĉar li estas mortemulo: ĉar lia vivo estas tiel mallonga, kaj mi dezirus ke tiu vivo estu laŭeble plena je feliĉo kaj ne mizero."



George Eliot, angla verkistino
(National Portrait Gallery, Londono)

Tiuj vortoj estis verkitaj de George Eliot, unu el la plej grandaj anglaj verkistoj de la 19a jarcento, aŭtoro interalie de la grandioza romano *Middlemarch*. Malgraŭ sia nomo, ŝi estis virino, kies vera nomo estis Mary Ann Evans (1819-1880).

George Eliot estis edukita en religia etoso, kaj ŝiaj plej fruaj verkoj (tradukoj) estis religiaj. En siaj fruaj dudekaj jaroj ŝi komencis dubi pri sia religia kredo, kaj ŝi ne plu deziris akompani sian amatan patron dimanĉe al la preĝejo. Ne dezirante kvereli kun li, ŝi tamen decidis ne insisti pri tio, kaj finfine ŝi plu vizitadis la preĝejon kun sia patro ĝis lia morto sep jarojn poste. Tamen ŝi rezervis la rajton teni

sian propran opinion pri la diservoj, kiujn ŝi devige ĉeestis.

Ŝi ne estus konsiderinta sin ateisto laŭ nia nuna ideo. Ŝi opiniis, ke kvankam la religio estas objektive malvera, subjektive ĝi estas vera: ne rilate al la ekzisto de Dio kaj iu postmorta vivo, sed pro tio, kion ĝi komunikas pri la homaj bezonoj kaj deziroj.

Ŝia vivo estis tre nekonvencia laŭ la rigoraj moroj de tiu epoko. Ŝi enamiĝis kun viro jam edziĝinta. Li ne plu loĝis kun sia edzino, sed tiutempe estis preskaŭ neeble eksgeedziĝi. Tial George Eliot vivis kun li needziniĝinte dum la postaj 26 jaroj: skandala afero en tiu tempo.

Pluraj el la plej gravaj literaturistoj estas enterigitaj, aŭ almenaŭ havas monumenton, en la fama preĝejo Westminster Abbey en Londono. Inter ili estas Dickens, Tennyson kaj Kipling. George Eliot estis tre fama kaj admirata en sia vivo, kaj oni atendus, ke ankaŭ ŝi meritus lokon tie. Sed pro siaj neortodoksaj vivo kaj opinioj, ŝi ne estis enterigita en Westminster Abbey sed en Highgate Cemetery, proksime al la tombo de Karl Marx.

**Anna Lowenstein (Britio)**

## Pliiĝas en Britujo la homoj sen religio

Nekredeble! La nombro de homoj en Britujo, kiuj difinas sin nereligiuloj, altiĝis je 46% dum la lastaj sep jaroj. Tio signifas, ke nereligiuloj estas la grupo, kiu plej rapide kreskas. Tiun informon donis la Oficejo de Naciaj Statistikoj (ONS), la 5an de aprilo 2019. Laŭ ĝiaj ciferoj, la nombro de homoj sen religio nun atingis 39% de la brita loĝantaro. Tio estas 8 milionoj pli da homoj ol en 2011.

La asocio *Humanists UK* admonis la registaron, ke ĝi atentu pri la novaj ciferoj kaj ke ĝiaj politikoj pli bone reprezentu la interesojn de tiu grava kaj kreskanta grupo de nereligiuloj.

La ciferoj ankaŭ montris, ke la nombro de homoj, kiuj deklaras sin kristanoj (el ĉiuj kristanaj subgrupoj), falis je 15%. Aliflanke islamanoj pliiĝis je 22%, judoj je 17%, kaj hinduoj je 13%.

*Humanists UK* tamen esprimis dubojn pri la vortumo de la demando, kiun oni uzis en la esploro: “Kiu




estas via religio?" Ĝi opinias, ke tiu demando emas trotaksi la ekziston de religia kredado, kaj fakte mezuras kulturajn kunligojn pli ol religian kredon. Ĝi premas, por ke la demando en la venonta popolnombrado fariĝu: "Kiu estas via eventuala religio?" Alia esploro, la British Social Attitudes Survey (Esploro pri britaj sociaj sintenoj) uzas du-partan demandon. Ĝi taksas, ke 52% da britoj havas neniun religion.

Laŭ la ĉefestrarano de *Humanists UK*, Andrew Copson: "La pliiĝo de nereligiuloj estas la plej granda loĝantara ŝanĝiĝo de la lastaj jardekoj. Tiuj ciferoj emfazas la bezonon, ke la registaro ne plu favoru la enradikiĝintan privilegiadon de religioj en niaj sociaj institucioj kaj kreu pli justajn politikojn, kiuj reprezentas ĉiujn, senkonsidere de religio aŭ kredo.

Religia privilegiado en Britujo inkluzivas interalie religiajn lernejojn finance subtenatajn de la ŝtato, kiuj rajtas diskriminacii rilate al enskribiĝo de lernantoj, devigan diservon en ĉiuj lernejoj, preĝadon en la Parlamento, kaj 26 voĉojn por la anglikana eklezio en la Parlamento.

*Fontoj: "Religion by Local Authority, Great Britain, 2011 to 2018" (esploro de ONS) kaj "Number of non-religious people in Britain jumps by 46%" (artikolo ĉe la retejo de Humanism UK - humanism.org.uk).* Resumis Anna Lowenstein (Britio).

## Humanismo en kimraj lernejoj


Ekde 2022 lernejoj en Kimrujo estos leĝe devigataj instrui pri humanismo en la kadro de lecionoj pri religio. Tio estas granda sukceso por la brita humanisma asocio, Humanists UK, kiu de jaroj kampanjas por inkluzivado de humanisma vidpunkto en la lerneja programo.

## Hispanoj ĉesas kredi, laŭ nova raporto

Laŭ nova esploro farita de Fondaĵo Ferrer i Guàrdia, 27% de la hispanoj estas nun ateistoj, agnostikuloj aŭ nekredantoj. La titolo de la raporto estas *Sekularismo en ciferoj, 2018.*

### LA PLIIĜO DE NEKREDANTOJ

Procentaĵo de la loĝantaro
Young people between 18 and 24: Gejunuloj inter 18 kaj 24 jaroj





La informoj estis kompilitaj plejparte de la Instituto de Naciaj Statistikoj (INE) kaj la Centro por Sociologia Esplorado. Ili montras, ke 48,9% de homoj inter la aĝoj 18 kaj 24 forturnis sin de la religio, dum nur 48,5% diras, ke ili sekvas kredo-sistemon. En la aĝ-grupo super 65 jaroj, aliflanke, 88,6% ankoraŭ kredas je Dio, kiu estis esenca elemento en iliaj vivoj kiam ili estis infanoj sub la regado de Franco.

### KREDANTOJ LAŬ LA AĜO

Procentaĵo de la loĝantaro.

Believers: Kredantoj / Non-believers: Ne-kredantoj / No answer: Ne respondis


Age groups: Aĝ-grupoj




La procentaĵo de kredantoj en Hispanujo estas nun 69,5%, el kiuj nur 26,6% deklaras sin aktivaj praktikantoj. Laŭ la aŭtoro de la raporto, Josep Mañe, neniam antaŭe estis tiel malmultaj. En 1980 nur 8,5% de la loĝantaro deklaris sin nekredantoj. Paralele kun la forlaso de religio, malpliiĝis ankaŭ la nombro de geedziĝaj ceremonioj en preĝejoj.

## AKTIVA PRAKTIKADO

Procentaĵo de la loĝantaro
Believers: Kredantoj / Non-practicing: Ne-praktikantaj / Practicing: Praktikantaj




Laŭ la raporto de Fondaĵo Ferrer i Guàrdia, en 2018 80,2% de geedziĝoj estis sekularaj, kompare kun 19,8% religiaj. Kontrastu la situacion en 1992, kiam nur 20,6% da paroj elektis sekularan ceremonion, kaj 79,4% preferis geedziĝi en preĝejo. Sekularaj geedziĝoj estas plej popularaj en Katalunujo kaj Eŭskujo, dum paroj el Ekstremaduro kaj Ceŭto estas plej entuziasmaj pri religiaj ceremonioj.

Komparante la hispanan situacion kun tiuj de aliaj landoj, Silvia Luque, la direktoro de Fondaĵo Ferrer i Guàrdia diras, "La Eŭropa Socia Esploro trovis, ke Pollando havas la plej altan procentaĵon de kredantoj, je 91%, pro kontraŭkomunismaj sentoj kaj poste la rolo de la papo Johano Paŭlo II." La esploro trovas, ke Litovujo sekvas kun 88%, Italujo 74%, Irlando 74%, Portugalujo 73% Aŭstrujo 73% kaj Hispanujo 69%. En Francujo, nur 53% de la loĝantaro estas kredantoj, verŝajne pro la apartigo de ŝtato kaj religio komence de la 20a jarcento, laŭ Luque. Ŝi opinias, ke Hispanujo fariĝas pli sekulara ĉar la pli junaj generacioj "estas malpli influataj de la nacia katolikismo de la epoko de generalo Franco."

## GEEDZIĜOJ

Procentaĵo de la loĝantaro
Religious ceremonies: Religiaj ceremonioj / Civil ceremonies: Ŝtataj ceremonioj



Laŭ Enrique Gil Calvo, sociologo kaj profesoro ĉe la Universitato Complutense de Madrido, gejunuloj nuntempe malpli emas kredi pro modernigo, edukado, kaj la liberiĝo de virinoj. Laŭ li: "La hodiaŭaj gejunuloj estas malpli religiemaj ol tiuj de antaŭaj generacioj, tamen ankoraŭ pli religiemaj ol tiuj de la estonteco. Religio ne povas kunekzisti kun racia scienco. Ju pli la estontaj generacioj ricevos bonan edukon, des pli kreskos racia scienco, kaj sekve estos malpli da spuroj de la antaŭmoderna religia superstiĉo."

Historiisto kaj antropologo María Lara atentigas, ke dum la historio la ĉefaj kolonoj de la religio estis timo kaj necerteco. "Se inter la aĝoj 14 kaj 24 oni studas kaj la gepatroj pagas la fakturojn, oni ne havas zorgojn. Kie mankas necerteco, malpli necesas turni sin al religio."

*Artikolo el la anglalingva retejo de la hispana ĵurnalo* El Pais *"Losing their religion? New report shows Spaniards are turning their backs on faith". Resumis ĝin esperante Anna Lowenstein (Britio).*

*La fonto de ĉiuj grafikaĵoj en ĉi tiu artikolo estas Fondaĵo Ferrer i Guàrdia Foundation surbaze de Instituto de Naciaj Statistikoj kaj la barometro de Centro por Sociologia Esplorado.*

## Furora filmo pri eklezia pedofilio




La tuta Pollando estas skuita de nova dokumenta filmo eldonita majmeze en Jutubo. Jam ĝi ricevis18 milionojn da rigardoj. La filmo titolita "Nur ne diru al iu ajn" (pole: *Tylko nie mów nikomu*) malkaŝas kazojn de seksa ekspluatado de infanoj fare de katolikaj pastroj en Pollando. Pluraj travivintoj rakontas pri siaj teruraj spertoj per la manoj de la reprezentantoj de tiu granda morala aŭtoritato, la Romkatolika Eklezio. Espereble tiu ĉi filmo, kune kun la drama filmo "Klerikaro"(*Kler*), kiu aperis en polaj kinejoj pasintjare, igos homojn forlasi la eklezion kaj malfortigos ĝian pozicion en la pola socio.

## Fermado de preĝejoj en Kanado: ĉu la civilizo disfalas?

Nekutime por tiu ĉi bulteno, jen artikolo verkita surbaze ĉefe de artikolo en katolika retejo. Temas ne nur pri iu ordinara katolika retejo, sed pri naciisma pol-katolika retejo radikale krucmilitanta, laŭ kiu Pollando havas historian mision antaŭenigi kristanisman civilizon. Laŭ la retejo, nomita *Polonia Christiania* (PCh), la kristanisma civilizo komencis disfali kiam venis la Reformacio, plue disfalis pro la Kleriĝo kaj la rezultanta el ĝi Franca Revolucio. Tiuj ĉi polaj religiaj zelotoj maltrankvilas ne nur pri la stato de la pola socio, sed ankaŭ pri aliaj socioj, eĉ foraj, kiel Kanado.

*Polonia Christiana* raportas, ke en la venontaj dek jaroj, la National Trust for Canada, organizaĵo, kiu zorgas pri historiaj heredaĵoj en Kanado, antaŭvidas la fermadon de 9,000 kristanaj preĝejoj en tiu lando, kiuj estas triono de la tuto. Fakte la fermado jam okazadas de multaj jaroj. Granda plimulto de la fermitaj kaj fermotaj preĝejoj troviĝas en kamparaj regionoj. Ekzemple, unu diocezo en Nov-Skotio fermis 30% de siaj preĝejoj dum la pasintaj dekdu jaroj. Kio okazas pri la preĝejoj? PCh indikas, ke ili estas malkonstruitaj aŭ transformitaj en loĝ-domojn aŭ butikejojn aŭ alispecajn komercajn lokojn. La retejo de CBC, la kanada nacia elsend-servo, en artikolo pri la preĝej-fermado, mencias aldonajn celojn: artgaleriojn, koncertejojn, bibliotekojn, komunumajn centrojn, eĉ mikrobierfarejojn. Laŭ PCh, kanadaj katolikoj protestas la fermojn kaj transformojn, sed ĝi ne mencias, ke eklezioj mem faras la decidojn pri fermado kaj vendado de siaj preĝejoj, kiel evidentas el la CBC-artikolo – krome PCh ne mencias, ke multaj fermataj preĝejoj estas protestantaj, do heredaĵoj de la Reformacio, kiun ĝikondamnas!

La granda demando estas: kial okazas tiu ĉi fenomeno? La artikoloj indikas tri ĉefajn kaŭzojn: la ŝrumpado de la kredantaro, altiĝantaj kostoj de konservado (kaj malpli da enspezoj pro la ŝrumpado), kaj ankaŭ malpliiĝado de pastroj. Sed ni fokusiĝu je la unua. La polaj retaj krucmilitistoj indikas, ke la kredantara malkresko estas ligita kun la elfluo de kamparaj loĝantoj al urboj serĉantaj laboron. Tamen, tio ne signifas, ke la urboj fariĝas pli religiemaj pro la enfluo el la kamparo – CBC menciias la sekulariĝon de la urboj kaj la sekvan falon de irado al preĝejoj. PCh kontraŭe sugestas, ke almenaŭ se temas pri la plej granda kanada urbo, Toronto, pli religiemaj




Detruado de ukraina grek-katolika preĝejo, Saskaĉevano
(Foto de: Peter Lozinski, Daily Herald)

enmigrantoj el eksterlando kompensas la sekulariĝon, kaj tie oni eĉ konstruas novajn preĝejojn.

Bone, sed se ni rigardas la statistikojn por sekulariĝo unuflanke, kaj elkampara elfluo aliflanke, komparante la ciferojn el la du lastaj popolnombradoj en Kanado (2001 kaj 2011), ni trovas ke senreligieco kreskis de 16,2% al 23,9%, dum la kampara loĝantaro falis nur de 20,6% al 18,9%. Do klare, eĉ en la kamparaj regionoj okazas sekulariĝo! Estos interese vidi, kion diros la sekvonta nombrado en 2021 pri la du demografiaj indikiloj, sed oni povas supozi daŭrigon de la du tendencoj kaj de la plirapideco de sekulariĝo kompare kun elkampara elfluo.

En Okcidenta Eŭropo ankaŭ troviĝas la fenomeno de preĝej-fermado kaj transformado al aliaj uzoj. En la lastaj jaroj, centoj da preĝejoj estis fermitaj. Ekzemple, en Londono troviĝas bifsteka restoracio en ekspreĝejo, kaj en Maastricht (Nederlando) libro-vendejo. Ambaŭ lokoj estas bele faritaj. La katolikaj fidelu-

loj de PCh alarme atentigas, ke en Okcidenta Eŭropo plua speco de transformado okazas: la ŝanĝo de kristanaj preĝejoj en moskeojn. Kontraste, en ilia lando Pollando oni eĉ konstruas novajn preĝejojn en multaj lokoj, foje sufiĉe grandajn.

Nu, kion pensi pri ĉio ĉi el ateista vidpunkto? Ĉu ateistoj ĝoju, ke fermiĝas kaj transformiĝas preĝejoj? Certe sekulariĝo kaj senreligiiĝo estas bonvenaj. Tamen, estus bedaŭrinde malkonstrui preĝejojn kun historia, arkitektura aŭ arta valoro. Pri transformado al iu komerca aŭ kultura aŭ aliacelo, oni povas diverse opinii, depende de la specifa situacio. La CBC-artikolo rimarkigas, ke multaj preĝejoj en Kanado servas aldone kiel centroj de komunuma vivo, kie okazas ne nur preĝado kaj diservoj, sed ankaŭ aliaj agadoj, do krom eblan historian kaj arkitekturan valoron, ili havas socian valoran. Sekve, ĉi-kaze, malkonstruado estas bedaŭrinda afero, sed foje ankaŭ aliceligo de preĝejo, ekz. al butikaro aŭ gimnastikejo. Se temas pri moskeigo de kristanaj preĝejoj, tio ja iom ĝenas ĉar ĝi signifas tendencon, kiu kontraŭas sekulariĝon, kaj ankaŭ oni povas bedaŭri perdon de tipa elemento de la eŭropa pejzaĝo.

Malgraŭ la pensado de radikalaj katolikoj kiel tiuj de *Polonia Christiana*, la fermado de preĝejoj (kaj foje forigo de ili) kaj sekulariĝo de iam kristanaj socioj ne signifas la disfalon de civilizo (por PCh, kristanismo kaj civilizo ŝajnas esti sinonimaj). La eŭropa kristana civilizo de la pasinteco tute ne estis io ideala – male, kristanismo kaŭzis multajn militojn, pravigis multajn barbarajn agojn. La eŭropa civilizo fakte estis fondita antaŭ kristanismo – la antikvaj grekoj kaj romianoj, kun siaj multaj dioj, jam atingis altan nivelon de civilizo, verŝajne pli alta ol en la mezepoka Eŭropo enprofundiĝinta en kristanismo. Tutcerte kristanismo ankaŭ havis pozitivajn flankojn, kaj eĉ sekulariĝantaj socioj devus aprezi la valoron de religie inspiritaj muziko, literaturo, festado, arto kaj arkitekturo.

**Nyegosh Dube (Pollando)**

*Tiu ĉi artikolo estis verkita surbaze de kaj reage al la artikoloj "Kanada: w ciągu 10 lat zamkniętych zostanie 9 tys. kościołów. Powód? Brak wiernych" el la retejo www.pch24.pl kaj "From sacred to secular: Canada set to lose 9,000 churches, warns national heritage group" el la retejo www.cbc.ca.*

## Apostatiĝo en Portugalio

*Enkonduko*: En la portugala ĉiutaga ĵurnalo *Diário de Notícias* (DN) de la 12a de januaro 2019, la ĵurnalistino Joana Capucho verkis artikolon pri apostatiĝo en Portugalio, apoginte sin sur la atestoj de kelkaj homoj, kiuj decidis forlasi siajn rilatojn al la katolika eklezio. Jen iom mallongigita traduko.

### Nuligi la bapton por eliri el la eklezio

Anstataŭ simple ignori la fakton, iuj homoj volis forigi la katolikan enskribiĝon. Ili ne plu estas kredantoj kaj pro tio rifuzas nutri katolikajn statistikojn. Al DN ili parolis pri ĉi tiu malliga procedo. La eklezio, siaflanke, ne kolektas datumojn pri apostatiĝoj, tamen la paroĥejoj parolas pri nesignifaj ciferoj.

"*Mi identiĝas kiel ateisma agnostikulo, alivorte mi kredas ke la homaro, pere de la racio kaj scienco, ankoraŭ ne kapablas pruvi la ekziston de unu aŭ pluraj dioj*", diras Fábio Cipriano Ventura, 24-jaraĝa studento en la inĝeniera fakultato de la Universitato de Beira Interior (UBI). Li estas inter la portugaloj – kies nombron oni ne scias – kiuj petis la nuligon de sia bapto. Li estis baptita en la 20a monato de sia vivo kaj ricevis la unuan komunion je sia 8-jariĝo. Post du jaroj, kiam la gepatroj lin permesis elekti ĉu daŭrigi la katekizadon, li rezignis. Li memoras: "*Tio tiam diris nenion al mi, ĝi estis nur perdita tempo*". Li ekperceptis kiom tiu "dia koncepto" estas al li fremda kaj sin ekdemandis pri sia religia orientiĝo. Tamen, kvankam jam frue li ekdubis pri religio, nur en 2015 li malkovris la eblecon de apostatiĝo (forlaso de katolika eklezio) pere de fejsbuka grupo. "*Neniam antaŭe venis en mian kapon la ideo nuligi la bapton kaj oficiale forlasi la eklezion. Tiam tuj mia meditado ekprofundiĝis.*"

Fábio multe legis, dialogis kun amikoj, apogpetis al patrino, kaj, fine, kiel novjara ĵuro, en 2018, li decidis apostatiĝi. Li konsciis pri homoj, kies apostatiĝpeto malrapidis dum monatoj kaj jaroj, sed en lia kazo tiu procedo estis "sufiĉe simpla" malgraŭ iuj neatenditaĵoj. La 9-an de januaro 2018 li skribis al sia bapto-paroĥejo leteron kun praviga apostatiĝ-peto. "*Al la letero mi aldonis koverton jam adresitan al mi kaj afrankitan por ricevi respondon letere.*" Sed pasis unu monato kaj ankoraŭ ne venis respondo. Do la 19-an de februaro, Fábio sendis ret-

mesaĝon al la paroĥejo kaj samtage ricevis reagon. "*La paroĥestro klarigis, ke li atendas instrukciojn de la diocezo ĉar neniam antaŭe tia peto estis ricevita tie.*" Sekve la 26-an de februaro, li ricevis retpoŝte paĝon de baptoregistrolibro kun noto skribita enmarĝene apud lia nomo pri lia apostatiĝo. Fizikan kopion li ricevis poŝte post kelkaj tagoj. "*Mi ne plu apartenos al oficialaj statistikoj de la eklezio, mi oficiale estas apostatiĝinta.*"

Laŭ datumoj de 2017 el Vatikano, la nombro de portugaloj baptitaj atingis 9,18 milionojn el 10,34 milionoj da loĝantoj, t.e. 88,7% de la tuto. Por tiu ĉi inĝeniera studento, ili estas "*troigaj ciferoj, kiuj ne spegulas la realon – kiom da portugaloj fakte kredas je katolikismo, senkonsidere ĉu ili estas praktikantoj aŭ ne? Tamen tiaj ciferoj legitimas la influon de la eklezio en nia lando, kvankam ni vivas en sekulara ŝtato*!" Li aludas, ekzemple, al religiaj festotagoj kaj al la influo de la eklezio en sociaj aferoj kiel abortigo, eŭtanazio kaj samseksema edz(in)iĝo. Kiel portugala civitano Fábio Ventura opinias, ke estas lia devo *"kunlabori por malpliigi la potencon kaj influon de la eklezio en nia lando*". Li ankaŭ kontraŭas "*ke oni baptu bebojn aŭ infanojn kies konsento ne eblas*".

**Sen naciaj datumoj**

La portugala episkopa konferenco sugestis al DN, ke ĝi demandu rekte al diocezoj, ĉar la konferenco ne posedas datumojn pri apostatiĝo. Tamen Nuno Rosário Rodrigues de la lisbona fako de eklezia komunikado diris, ke "*en la lisbona diocezo ne troviĝas ciferoj pri petoj de apostatiĝo*". Li klopodis klarigi, ke "*la ĝenerala vikariato de la diocezo aprobas apostatiĝan peton, kiu estas sendita de la paroĥestro, kaj informas tiun ĉi kun la celo aldoni noton en la paroĥeja baptoregistrolibro pri tiu rezigno de la katolika fido. Do, restas nenia statistiko.*"!? (Noto: pri ĉi ekkria kaj demanda signoj respondecas la tradukinto).

En la diocezo de Porto, petoj pri nuligo de bapto "*kvankam ne estante nulaj, estas nepre sensignifaj*". Nestor Camões, kanceliero de dioceza kurio de Aveiro, scias pri "*unu aŭ du petoj dum la lastaj jaroj.*" Li garantias, ke "*Ili estas treege maloftaj. Tio estas raraĵo.*"

Carlos Esperança, prezidanto de Portugala Ateista Asocio (PAA) certigas, ke krom "*tiuj diocezoj, kie tion eblas atingi*", estas aliaj kies pastroj rifuzas la petojn. "*Mi persone ne sukcesis. Mi faris peton en la diocezo de Guarda, sed sensukcese*", li asertis. Tiel konserviĝas "*tro alta cifero pri*

*la nombro da katolikoj*", kiu ne akordiĝas al la realo, laŭ li.

Manuel Matos, vicepiskopo de la diocezo de Guarda, diras ke ne temas pri akcepto aŭ neakcepto de petoj. "*Kiam iu rifuzas sian baptosituacion, nek detruiĝas la registra folio, nek nuliĝas la bapto. Tamen, se iu formale deklaras volon ne resti katolika, estas skribite sur la koncerna baptofolio, ke en la tago X iu sendis formalan peton por rifuzi la kristanan fidon.*" Li aldonas, ke ne estas cifera registro pri apostatiĝo en lia diocezo.

Esperança diras, ke "*PAA tre ofte ricevas demandojn de homoj kiuj celas atingi malbapton*", sed ne eblas konstati ĉu apostatiĝo en Portugalio plioftiĝas. "*Datumojn ni ne havas. Tamen, estas periodoj en kiuj multaj homoj petas malaliĝon*", asertas li. Inter la motivoj por nuligi la bapton, laŭ la prezidanto de PAA, reliefiĝas la fakto ke multaj homoj "*ne konsentas ke la eklezio misuzu nereligiemajn homojn por postuli privilegiojn*". Krome, temas pri "*etikaj aferoj*", li aldonas, "*simile al situacio en kiu politika partio enskribas kiel partianon homon kies ideologio estas malproksima de ĝia*".

Alexandra, metilernantino, 25-jaraĝa, klopodas formale forlasi la katolikan eklezion nuntempe. "*Tuj kiam mi konsciis pri tia eblo mi promesis al mi mem, ke mi ne mortos baptita, kaj iam forviŝos tiun etikedon ne elektitan de mi*". Ŝi ne volas "*aparteni al religio, kiu respondecas pri masakroj, malakcepto de scienco, rasismo, kaj postulas arkaikajn instruojn*".

Kvankam ŝi estis baptita je la frua aĝo de 18 monatoj, Alexandra neniam praktikis la religion pro nereligiema familia etoso. Tamen ŝi konfesas, ke "*Mi iom koleras, ke mi ne havis elektan eblon, kaj tion mi tute ne akceptas*". Ŝi agnoskas, ke fari nenion ne ŝanĝos ŝian vivon, sed tamen ŝi ne volas daŭre nutri malverajn statistikojn. "*Mi havas apogon de miaj gepatroj je 100%, ili bone komprenas mian vidpunkton*", substrekas la junulino, kiu nun sekvas la proceduron por antaŭenigi la apostatiĝon.

Ankaŭ Marco Coelho, komerca direktoro, 29-jaraĝa, petis nuligon de la bapto. "*Mi ne estas kredanto, mi malakceptas multe da praktikoj de la katolika eklezio kaj ĝian politikan potencon en nia lando. Mi opinias, ke la religio estas la plej grava baro al socia evoluo*". Li decidis apostatiĝi ankaŭ por diskonigi tian eblon. "*La dogmoj baras la debatadon kaj ĉio daŭre persistos sammaniere se homoj*

*kiel ni senkuraĝiĝus antaŭ la socia premo koncerne aferojn, kiujn oni supozas netuŝeblaj*". Kiam "*netoleremo ŝajnas kreski ekstermezure, tre gravas malhelpi potencajn instituciojn malmoderemajn, kiuj malhelpas debatadon kaj kreas fendojn, kelkfoje drastajn kaj ekstremajn, inter homoj kun malsimilaj vidpunktoj*".

Netoleremaj politikoj kelkfoje povas havas kontraŭan efikon, kiel okazis, ekzemple, en Argentino lastjare, kiam centoj da katolikoj promociis kolektivan apostatiĝon proteste al la rigida katolika doktrino pri la abortigo. *(Por artikolo pri tio ĉi, rigardu en* Ateismo*, novembro 2018 – red.).*

Tradukita de:

**Luís Ladeira (Portugalio)**

*La originala artikolo havas la titolon "Apostasia: anular o batismo para sair da Igreja Católica" kaj troveblas en la retejo de la ĵurnalo* Diário de Notícias *(www.dn.pt).*

## ATEO kaj la Kunkongreso en Dovro

Kiam mi legis la programon de la kunkongreso (kunkongreso ĉar komune kongresis Esperanto-Asocio de Britio kaj Espéranto-France), mi vidis, ke okazos ekumena diservo lunde. Tuj mi reagis, atentigante ke tio ne povas esti anoncita en la oficiala programo, kaj ĉar en tiu mo-



Dovra Kastelo, Anglio
(Foto de: www.indexmagazine.co.uk)

mento de la preparoj ne aperis ajna paralela programero, mi petis ĉu ne eblus samtempe en la kongresejo organizi kunvenon de ATEO.

Respondo de la organizanto: la diservo ne estas oficiala programero, ĝi estas organizita kaj pagita ne de la kongreso, sed de alia grupo. Li devas anonci ĝin, ĉar parto de la kongresanaro tre interesiĝas pri ĝi. Sed li pretas *private* aranĝi ion por ni. Poste montriĝis, ke tamen estas programeroj paralelaj al la diservo, kaj ke ne disponeblas salono.

La situacio pri salonoj estis iom stranga, ĉar pri malgrandaj salonoj, kiujn oni uzis por la bonveniga bufedo kaj la lunĉo, oni ne sciis, ĉu oni disponos je ili.

Fine la tikla afero, kiun ni NE konstatis alvenante al la kongresejo (kiu aspektas kiel iu lernejo/kulturcentro) estis ke la ĉefa salono estas… preĝejo! Tion mi konstatis nur lunde, kiam estis granda ligna kruco, kiun oni forportis antaŭ koncerto.

Nu, pro tio, la organizanto preferis, ke ni faru diskrete reklamon. Fine ni interkonsentis, ke ni metos (diskrete) plurajn ekzemplerojn de la bulteno sur tablon kie estis disponigataj senpage "neŭtralaj" revuoj. Kaj mi petis permeson fari publikan anoncon per mikrofono antaŭ la komenciĝo de filmo prezentata en la plej granda salono de la kongresejo (ĝuste en la horo de la diservo). Ne grandioza atingo, sed ne senutila interveno. Tio almenaŭ montris la ekziston de ATEO kaj vekis la interesiĝon de kelkaj homoj.

Kial mi skribas pri tiaj ŝajne bagatelaj aferoj? Ĉar la afero ne estas nova kaj ade ripetiĝas en diversaj kongresoj. Malfacilas kompreni ke se estas ekumena aŭ alia diservo, ĝi devas esti klare apartigita de la oficiala programo. Kaj ke estu eblecoj por alternativa kunveno.

**Claude Nourmont (Francio)**

**ĈU VI PAGIS VIAN KOTIZON?**
**FARI BONVOLU.**
**DANKON!**

## Kunveno de ATEO dum la itala kongreso (tamen ne...)

Inspirite de la provo de Claude organizi kunvenon de ATEO dum la brita/franca kongreso en Dovro (vidu supre), mi havis la ideon organizi kunvenon dum la itala kongreso, kiun mi ĉeestos fine de aŭgusto. Mi bone komprenas, ke estis problemo en Dovro, ĉar Claude petis lastmomente, kaj kompreneble oni ne povas esperi nepre ricevi ĉambron tri tagojn antaŭ la kongreso. Sed se mi petus tri monatojn antaŭ kongreso, ne devus esti problemo.

Mi aldonu, cetere, ke mi ja organizis neformalan kunvenon de ATEO dum la itala kongreso en 2016, sed same kiel Claude mi faris tion lastmomente, eĉ dum la kongreso mem. Oni disponigis al mi liberan ĉambron, sed kompreneble la aranĝo ne aperis en la jam presita programo, kaj mi devis meti afiŝojn tra la kongresejo la antaŭan tagon. Denove estis problemeto, ĉar la aranĝo okazis ne en preĝejo, kiel en Dovro, tamen en religia centro (tiuj estas malmultekostaj kunvenejoj en Italujo), do mi mem ne volis kaŭzi embarason al la organizantoj. Tial la vortumo sur la afiŝoj estis sufiĉe diskreta.

Ĉi-jare, mi pensis, ĉio estos en ordo. Mi mendos la salonon frue, salono devos esti disponebla, la aranĝo eĉ aperos en la programo. Jen la respondo, kiun mi ricevis de la ĉefa organizantino de la kongreso: “Dankegon por viaj proponoj. La kongresa programo estas tre riĉa, eble iom tro, pro tio la proponon de ATEO ni opinias neoportune akcepti. Oni riskas havi pli da programoj ol publiko.”

Mi forte dubas, ĉu ŝia decido ne doni spacon al ATEO rilatis al tro plena programo.

**Anna Lowenstein (Britio)**

# ATEISMO

## Organo de ATEO
## Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo


**Vorto de la Redaktoro** 2

**Pensoj kaj Reagoj**

Kial mi estas senreligia: pensoj de fizikisto 3

Klimato kaj religia kredo 5

**Historiaj Perspektivoj**

Perforta kristanigo en Eŭropo: persekutado de paganoj 7

George Eliot: ne precize ateisto 12

**Ĉirkau la Mondo: Novaĵoj kaj Tendencoj**

Pliiĝas en Britujo la homoj sen religio 13

Humanismo en kimraj lernejoj 14

Hispanoj ĉesas kredi, laŭ nova raporto 15

Furora filmo pri eklezia pedofilio 18

Fermado de preĝejoj en Kanado: ĉu la civilizo disfalas? 19

Apostatiĝo en Portugalio 22

**Ateisma Vivo**

ATEO kaj la Kunkongreso en Dovro 25

Kunveno de ATEO dum la itala kongreso (tamen ne...) 27



Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:
**ateismo.bulteno@gmail.com**
Por informo:
**anna.lowenstein@esperanto.org**

Prezidanto (vakas)
Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francio
Sekretario: Anna Lowenstein, Britio
Kasisto: Dieter Rooke, Svislando
Enpaĝigo: Jakvo Schram, Belgio
Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando
Jarkotizo: 10€ por A-landoj
8€ por B-landoj
Konto: **ateo-y** ĉe UEA